# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №5 Majo, 2010

Kara Leganto! Pro la organiza miskompreno ne ĉiuj niaj membroj partoprenis pasintan kunvenonde nia E-societo. La estraro pardonpetas. Alloke oni devas akcenti je tiu grava fakto, ke nia maja kunsido okazos la 3-an mardon (vidu informon sube). Ne okazos kunvenon junie, ĉar ni piknikos en la sama loko, kie pasintjare.

–La Redakcio

## Slava Paganismo




Kristanismo kaj paganismo, kiel kontraŭstarantaj spiritaj kulturoj, estis en ĉiama konkurado, eĉ militstato: dekomence paganismo penis nuligi kristanismon, poste – male. Kaj tiu milito ofte havis sovaĝajn formojn. Kialoj de tiu kontraŭstaro estis ne tiel ritaj, kiel mondkonceptaj: paganismo traktis batalon inter bono kaj malbono ne en la homo, sed en la naturo, ekster la homa estaĵo. Ja kristanismo transprenis tiun batalon en la homon, ruinigis spiritan unuecon de la homo kaj fakte – homan psikon.

**ENIGMO DE LA ZBRUĈA IDOLO**. Tiu loko estas bone konata al gesamideanoj de okcidenta parto (kaj ne nur) de Ukrainio: dum pasintaj dudek jaroj E-klubo de Ternopil aranĝas tie tradician bivuakan kunvenon ĉe rivero Zbruĉ – EsTeRo (Esperanta Ternopila Renkontiĝo). Sed tiu loko estas fama inter ankaŭ historiistoj de la slava kulturo kaj religio pro alia evento – ĝuste tie ĉi oni elriverigis Zbruĉan (laŭ nomo de rivero) idolon – solan konserviĝantan kultan statuon de pagana (antaŭkristana) religio de praslavoj. Antaŭ 160 jaroj (1851) tiu figuro aperis en konstanta ekspozicio de Krakova Arkeologia Muzeo (Pollando). Dum longaj kvin semajnoj oni veturigis 2,6 metran statuon de ukraina vilaĝo Liĉkivci al la pola urbo Krakovo.

La idolo mem estas kvar-edra fosto (kun kvadrato en sekco), farita el korala kalkŝtono proksimume en IX jarcento, kun ĉizitaĵoj sur ĉiuj kvar vertikalaj flankoj. Figuron kronas kvarvizaĝa kapo sub unu ĉapo kaj ĉiu vertikala bildo konsistas el tri zonoj. Bildojn de la idolo provis deĉifri multaj scienculoj – germanaj, polaj, rusaj, sovetiaj, ukrainaj. Ne ĉio estas klara eĉ nun, sed senduba estas fakto, ke la tuta kompozicio respegulas tri spacojn de antikve imagata mondo: ĉielo (supra zono), tero (meza) kaj subtera mondo-infero. Interese, ke unu faceto de malsupra zono ne surhavas bildon. Pro tio esploristoj konsideras tiun tutan fostflankon kiel malantaŭa. Tri aliaj facetoj de pieda zono surhavas tri bildojn de, supozeble, unu surgenuiĝinta persono, kiu estas montrita de antaŭa, dekstra kaj maldekstra flankoj. Tiu homfiguro subtenas la tutan supran "mondon".

Inter kvar bildoj de la plej supra zono troviĝas du inaj kaj du viraj figuroj. Ili, kredeble, respegulas kvar sezonojn kaj kvar ĉefajn praslavajn gediojn. Ino kun ringo (laŭ G. Lenczyk) estas Lada – diino de printempo, semado, amo kaj familio. Najbaras ŝin alia ina figuro kun korno de abundeco kaj eta bebo – diino Mokoŝa – patrino de rikolto. Postsekvas ŝin "vira" flanko, kie oni povas vidi soldaton kun glavo kaj ĉevalo. Sendube, tiu estas imago de Peruno – dio de fulmotondro, milito, je kies nomo praukrainaj princoj ĵuris, tenante manon sur glavo.

Kaj sur la malantaŭa flanko, kies malsupra zono restas senbilda, estis ĉizata alia ula figuro, posedanta sur la brusto sun-signon, t.e. rado kun ses radioj. Tiu povus esti aŭ Ĥors – dio de suno, aŭ Daĵdboh – dio de la blanka (taga, suna) lumo. Laŭ akademiano B. Rybakov, Daĵdboh, kiu ne estis suno mem, havis menciitan sun-signon sur sia vestaĵo…





Al kiu apartenas bildo de surgenuiĝinta figuro kun tri vizaĝoj en la plej malsupra zono? Kiel jam estis menciita, tio estas imago de iu dio, ĉar, se rektigi ĝin, figuro estus samalta kun diaj bildoj de la supra zono. Supozeble, tiu estas Veles (aŭ Volos). Malgraŭ ke li estis kunligata kun subtera mondo, antikvaj slavoj ne konsideris lin "malamika" (fremda) dio, eĉ male, li estis dio de brutaro kaj riĉeco. Lia nomo oftis en kontraktoj inter Kijiva Rusjo kaj Bizanco.

Al kiu apartenas ĉapo? Kelkaj konsideras, ke supre estas ĉefdio – Svi(a)tovid(t) – tiu, kiu vidas mondon. Tiun trajton povas havi nur unu – la plej alta dio, kiu devas unuigi la tutan ĉirkaŭaĵon, t.e. universon, lin admiris ne nur praŭloj de nuntempaj ukrainoj, sed ankaŭ nordaj praslavoj ĉe Balta maro kaj sudaj – sur nuna kroata insulo Braĉ.

Pli frue oni akuzis paganismon en multdieco, dirinte, ke unudieco estas atingo de kristanismo. Sed monoteismo ekzistis ĉe praslavoj kaj tiu dio estis Svitovido. Restas nun enigmo, kial Volodimir ne utiligis lin, sed kreis artefaritan panteonon, kiu fakte ne respegulis popolajn (lokajn) tradiciojn? Kaj tiu ukraina "Olimpo" vivis nur 8 jarojn, poste venis "fremda" kristanismo, kiu ne donis atenditan bonon al Rusjo – la ŝtato disfalis. Do, nur loka, ne importata religio povas unuigi popolon. *–Viktoro Pajuk*

## Nia(j) aŭtoro(j)



En nia aprila n-ro aperis anglalingva poemo de Srikanth Reddy (vd la foton). Hodiaŭ ni aldonas informon pri la aŭtoro. Lia unua poemaro *Facts for Visitors* ricevis la *Asian American Literary Award* por poezio en 2005; lia dua libro *Voyager* baldaŭ aperos (printempo, 2011) en la eldonejo de Universitato de KA. Fininto de doktora programo en la angla lingvo ĉe Harvarda Universitato, s-ro Reddy nun estas docento ĉe la Universitato de Ĉikago.

## Eldonaĵo por Virinoj!

Nome de la Brita Biblioteko (BB) mi sincere dankas vin pri la valora donPlezure ni sciigas Vin, ke Legio de Bona Volo (LBV) aperigis specialan revuon BONA VOLO – VIRINO, kiel simpla omaĝo al ĉiuj virinoj, al la anonimaj kaj al tiuj kiuj elstariĝas sur la diversaj kampoj de la homa agado. Al ili, kiuj pli kaj pli dividas kun la viroj la hejmtaskojn kaj la plej gravajn decidojn favore al la Homaro, vidu: http://www.boavontade.com/pdf/BonaVolo/66.pdf

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

18an de Majo – komputila E-ludo (R. Ekstrom)

27an de Junio – tradicia pikniko

27an de Julio – Andreo Kolganov klarigos pri "Utilkompanioj de Usono: Akvo, Elektro, Gaso"

24an de Aŭgusto – kunsido dediĉata al UK en Havano